Por ĉiutagaj informoj, eventoj kaj interesaj enhavoj, sekvu ankaŭ nian paĝon ĉe Facebook kaj Twitter.

# tejo:aktuale

n°477 | Oktobro 2022




Post unu monato okazos la granda reta evento de TEJO - Retoso 2022!
Denove pretos bunta programo kun babilĉambroj, prelegoj, muziko, ludoj kaj aliaj mojosaĵoj. Marku en viaj kalendaroj **semajnfinon 24 - 27 de novembro** kaj jam aliĝu! 💜




[Iĝu Komitatano B de TEJO!](#) Ni bonvenigas kandidatiĝojn por **komitatano B de TEJO** de decembro 2022 ĝis novembro 2024. Restas nur kelkaj tagoj por kandidatiĝi, la limdato estas la **31a de oktobro**.




[Invitu IJK-n 2024 en via lando!](#) Daŭrigu la longdaŭran tradicion de la plej granda kaj mojosa internacia evento de la mondo: la IJK! Ĉu vi ŝatus kunlabori kun TEJO por okazigi la IJK-n? **Anoncu vin!**

---

# Lastatempa agado

Ĉu vi jam legis la lastan numeron de **Kontakto** kaj lernis pri Nederlando, petveturado, maŝinoj aŭ feliĉo? **Se ne, elŝutu la revuon** [ĉi tie](#) **kaj ĝuu!**




Nia franca landa sekcio, JEFO, sponsoris **videon de la** [jutubisto Linguisticae](#), kiu temas pri lingvopolitiko, kaj pri propedeŭtiko, aparte pri propedeŭtiko de esperanto. Jam pli ol 100 000 homoj spektis ĝin. **Ĉu vi?**



La **62-a Argentina Kongreso de Esperanto** okazis de la 7a ĝis la 10a de oktobro. Inter aliaj tre interesaj programeroj, la partoprenantoj laboris kune pri la temo "*Labori kune estas pli bone ol labori izolite*". [Legu la sugestojn de la kongresanoj!](#)




De la 21a ĝis la 23a de oktobro, [JEFO](#) kaj [GEJ](#) kunorganizis la jubilean eldonon de **Kreema Esperanto-KurSO (KEKSO)**, en Germanio. Okazis lingvokurso de Esperanto, trejnado pri sociaj retoj, kaj kompreneble manĝado de keksoj!



La 1an de septembro LEJO (Litova Esperanta Junulara Organizo) ricevis sian juran personecon, kaj jam organizis mojosan LEJO-Feston kun memeejo, gufujo kaj multaj aliaj amuzaĵoj. Ili nun pretigas sian formalan aliĝon kiel landa sekcio!




La 23an de oktobro okazis la fonda kunsido de ALEJ (Aotearoa Ligo de Esperantistoj Junaj), de Novzelando. Ili ankaŭ preparas sian oficialan akcepton kiel landa sekcio, kiu fakte estus la unua de Oceanio.

La **komisiono pri Junaj Amikoj** ekaktiviĝas per novaj planoj por la venonta periodo. Baldaŭ okazos neformala, franka babilado dum Retoso. Ne maltrafu ĝin!

Se vi volas aliĝi al la komisiono skribu al *patricio.arg@tejo.org*.



---

# Venontaj eventoj




Je dimanĉo la **30-a de oktobro** (**8:30 - 11:30 UTC**) okazos cerbumado pri estontaj muzikaloj, kaj aliaj teatraj kaj filmaj projektoj, **dum KKPS kaj per** Zoom. Se vi havas jam ideojn, sendu ilin alklakante ĉi tiun ligilon.




La 10a Azia-Oceania Kongreso de Esperanto okazos en Busano, Sud-Koreio de la **3a ĝis la 6a de novembro 2022**. En la programo okazos pluraj kulturaj, movadaj, kaj temaj programeroj, inkluzive de laborkunsido inter azia kaj oceania junularo.




Retoso okazos denove **inter la 24a kaj la 27a de novembro!** Ĝi donos al la homoj la eblon amuziĝi, lerni kaj renkontiĝi kun (novaj) amikoj en Esperantujo per la interreto. Aliĝu!




Samtempe kun **Retoso (24. - 27. 11)**, UEA organizas la **3-an Virtualan Kongreson**, kaj vi libere povos ĉeesti sesiojn de ambaŭ eventoj – do eĉ pli granda kaj bunta elekto de programeroj atendas vin!





Aliĝu al la reta babilrondo "**Babilu kun amikemaj esperantistoj**" kun Karina Oliveira en Duolingo Classes! Renkontiĝoj okazas **ĉiun dimanĉon 22:00 UTC** kaj **mardon 09:00 UTC** ĝis la fino de novembro.

---

Trovu pli da eventoj sur la retejo eventaservo.org.

**Por pli da TEJO eventoj, alklaku la bildon!**




---




**Iĝu parto de nia tutmonda komunumo!**

**MEMBRIĜU EN TEJO!**

Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la Revuon Kontakto kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale?**
Sendu viajn novaĵojn al **tejoaktuale@tejo.org** antaŭ la 23-a tago de la monato
Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Jeanne Grimaud
**Kontribuanto de ĉi tiu numero:** Clément Baleyte

**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) • tejo.org

*Kopirajto © 2022 TEJO*
*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands